


Deliciaj Novjaroj 1997




Januaro - 1997 - N° 17-a


ASTURIO

ENHAVO

- 2..Nia Urbo
- 3..Zamenhofa festo
en Gijon
- 4...Ayalgas aŭ Atalayas
- 5...Madrigalo
- 6-7Bezono de la Internacia
Lingvo tra la Historio
- 8...La Kosmavagulo
- 9...Mesaĝoj
- 10.Odo al kampara Hejmo
- 11.La origino de la fajro
- 12.Sentemo
- 13.Ankoraŭ sep vivoj
- 14.Reao
- 15.Amuzaĵoj
- 16.Laŭ tradicia kutimo



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



NIA URBO

Estraro de ANTAŬEN

* * * * *

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino: M^a Luisa Menéndez

Kasisto: Celestino Fernández

Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Císimo Rabanedo

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Luis González

David Menéndez

Eva González

* * * * *

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura
33400 AVILES (Asturias)
Tfn° - 98-554 11 27

Subvenciita per la Registraro de la
Avilesa Municipo.

Depósito legal n° As. 1398 (9)

Ne plu ol du horoj permesas supraĵan konon el monumenta Avilés, samtempe oni pasas tra interesaj zonoj de la antikva urbo.

Kelke da tempo ni povas haltigi en la Parko Ferrera, vera pulmo de la urbo, trankvileca stagnejo kaj rigardi la arbajn specojn perfekte signalitajn por ilia identigo.

En plena Parko oni povas legi ĵurnalojn kaj multe da revuoj en biblioteko, kiu estas situata en tiu-ĉi loko.

Ne tre malproksime, alia parko, tiu de la Magdalena de ĵusa kreado, staras fronte al la Municipa Plursporta Pavilono dotita de bonega kovrita kaj klimatizita naĝejo, same kiel de malkovritaj kurejoj por la praktiko el la plej diversaj sportaj specialaĵoj.

La Redakcio (Daŭrigos)

ZAMENHOFA FESTO 1996

Altestimataj geamikoj kaj gesamideanoj

Kiel ĉiu jaro, la esperantistoj en la tuta mondo celebros la 137-an datrevenon de la naskiĝo de Dr. ZAMENHOF, iniciatinto de la internacia lingvo ESPERANTO.

Ĉi tiu jaro, la ASTURA ESPERANTO-ASOCIO ankaŭ celebros ĝin, laŭ la jena programo:

DIMANĈO 15-a de decembro.-

12,30-a. horo *Ofero de florbukedoj en la strato ESPERANTO.*

13,15-a. horo *Sankta Meso (en Esperanto). Preĝejo "Sankta Nikolao", (antaŭ la strato Esperanto).*

14,30-a. horo *Frata bankedo en la Restoracio "HUMEDAL", strato Prendes Pando, 8 (apud la Juĝejoj)*

Antaŭ ol la bankedo kaj en la sama restoracio, prelego de la kantabra samideano MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ, la temo estos "La Nuna Esperanto-movado"

MENUO DE LA BANKEDO:

1° *Supo el marbestoj*

Sopa de marisco

2° *Miksita paeljo*

Paella mixta

3° *Farĉita Merluĉo*

Merluza rellena

aŭ

aŭ

Legoma miksaĵo (Raguo)

Menestra

Rostita ŝafido

Cordero al horno

*Deserto, pano, trinkaĵoj, kafo kaj "glutetoj da likvoroj". Prezo: 1.300 ESP
Postre, pan, vino ó agua, café y "chupitos".*

Okaze de ĉi tiu evento, ni havas la plezuron inviti vin partopreni la programon, esperante ĝui agrablan kaj fratecan tagon, kiel kutime.

ASTURA ESPERANTO-ASOCIO profitas la okazon por gratuli kaj deziri al vi ĉiuj, felicán KRISTNASKON, sanan, pacan kaj prosperan NOVAN JARON 1997.

Ricevu antaŭtempajn salutojn de bonveno.

Telefonoj por sciigi al ni vian ĉeeston: 534 37 30 aŭ 536 29 42. Bonvolu komuniki ĝin antaŭ ol la 12-a de decembro. Dankon!



AYALGAS AŬ ATALAYAS



La “Ayalgas” estas ŝorcistaj feinoj, junulinoj kaj belaj, ili vestiĝas kun blanka virinmantelo kiel la ŝaŭmo el la maro. Rubando de belaj kaj bonodoraj floroj, zonas siajn gracilajn taliojn. Ŝiaj hararoj estas blondaj kaj plektataj en formo de kronoj kovrante ŝiajn blankajn fruntojn.


Ili loĝas en kristalaj palacoj, meze de iu montaro. La enirejo de siaj palacoj ĉiam estas kaŝita per iu trabora trunko el arbo, aŭ ĉe profundegaĵo kovrita per densaj arbustaroj.

En siaj palacoj, la “ayalgas” gardas grandajn trezorojn, Je la nokto de Sankta Johano, ruĝa kaj mistera flamo aperas interne de ŝiaj grotoj; se iu sukcesas ekvidi ĝin kaj havas la kuraĝon por alproksimiĝi ĝin, forpelante al la brulado malgrandan branĉeton el saliko, la flamo estingiĝos, aperante “Ayalga”. La feino forpreniĝas la rubandon el ŝia talio kaj prenante ekstremo el ĝi, ŝi donas la alian al la bonsorta eltrovanto. Ŝi penetras en la groton kaj plenigas da oro ŝian sekvanton, revenante lin al la enirejo, ŝi malaperas post momentoj. Se la bonsorto estas edziĝita, la feino naskigos en la koro de lia edzino dolĉan kaj eternan amon. Se li estas fraŭlo, baldaŭ li trovos junulinon kiu amos lin kun tuta ŝia koro.

Ludoviko.

MADRIGALO

& & &



Se la floroj posedus harmonion

kaŝitan inter siaj petaloj,

kaj se aŭdus iun tagon,

same kiel en sonĝo,

iujn notojn dolĉegajn kaj flugemajn

kiel mildan skizon

el teneraj, promesoj kaj karesoj

kaj murmuroj el kisoj...


mi devus kredi je la miraklo

ke mi auskultas la eĥon

gajan de via ridado, glitantan

inter aromaj kaj petaloj

Verkita : Luis Menéndez Lumen
Esperantigis .- Maria Luisa Menéndez



BEZONO DE LA INTERNACIA LINGVO TRA LA HISTORIO

I

Tra ĉiuj la periodoj de la historio de la homaro, ekde divers-lingvaj popoloj komencis establi kontaktojn inter ili, la lingvistikaj malfacilaĵoj eble aperis kiel barilo por iliaj rilatoj.

Preterlasante la primitiva maniero por kompreniĝi per gestoj, ĉiuj, je nia "klara kaj tre civiliza epoko", eĉ la plej instruitaj personoj devas ofte uzi eksterlande, aŭ, en alia autonoma komunumo, por komuniki siajn plej elementajn necesojn, la problemo solviĝis tra la jarcentoj, almenaŭ, parte, alia maniere. Je diversaj historiaj epokoj, sub la influo de la politikaj kaj kulturaj eventoj oni uzis diversajn hegemoniajn lingvojn, ofte dum longa tempo kaj en vastaj teritorioj, kiel instrumento de komuniko sur aliaj lingvoj kaj regionaj dialektoj¹.

Dum jarcentoj, tiel rolo estis plenumita de la Ĉinia literatura lingvo, kreita sur la bazo de la Pekinesa dialekto kaj, nuntempe, en intensa proceso de disvolvado. En la teritorio de tiu-ĉi granda lando ekzistis samtempe numeraj lingvoj kaj dialektoj, tre malsamaj inter ili, ĉiuj diferencas de la oficiala lingvo ne nur pro ilia fonetiko, sed ankaŭ pro ilia leksiko, kaj, parte, eĉ pro ilia gramatiko. La Ĉinia skribarto, konata ekde la XIV^a (dekvara) jarcento antaŭ nia Erao, kaj poste establiĝita en Japanio, Koreo kaj Vietnamo, estis foje multpova vehiklo por diskonigo de la Ĉinia kulturo, kaj komunika maniero sur la lingvaj multvarioj.

¹ A. Meillet kaj M. Cohen diras, en ilia verko *Les Langues du Monde*, Paris, 1952, ke oni ne povas trovi kriterion kio povas esti aplikita por distingi inter lingvo kaj regiona dialekto.





Similan rolon plenumigis la Greka lingvo KOINĜE, kiu estis formita de mikso de Grekaj dialektoj, kun la Jonika lingvo kiel ĉefa bazo. Alejandro la Granda enmetis tian novan lingvon, komunan en la konkeritaj landoj, per sia armeo (334-324 a. K.). Ĝi devenis oficialan lingvon de kelkaj regnoj je la helena epoko kaj, dum kelkaj jarcentoj, oni uzis ĝin kiel komuna lingvo sur numeraj lingvoj ekde la maro Adriatiko ĝis la interno de Asio, ekde la Norda Afriko ĝis la maraj regionoj de la Maro Nigra. Poste, la Greka lingvo estis, je la Mezepoko, dum multaj jarcentoj, la oficiala lingvo de Bizancio.

Ĉi-tiu sence, alprenis pli da gravecon la Latina lingvo, devenita de la Lacio (Latium), aŭ, pli ekzakte, de la patricioj de la urbo de Romo, kiu riĉiĝis kun alportajojn de la venkitaj lingvoj. Ekde Romo, ĝi disvastiĝis al la apudaj teritorioj, poste, ĝi superregis la aliajn Italajn lingvojn kaj, finfine, la Romaj legioj enmetis ĝin en la tuta okcidenta mondo. Multnumerajn lingvojn kaj dialektojn oni parolis sur tia vasta tera surfaco, sed la Latina lingvo elstaris kiel oficiala lingvo, kiu estis, samtempe, la lingvo de la kulturo, la komerco kaj la intertribaj rilatoj je la sino de la Imperio.

Kiam, je la V^a (kvina) jarcento, la Okcidenta Imperio falis sub la ebenigantaj atakoj de la barbaroj, la Latina lingvo ne estis jam la oficiala lingvo de la Stato, sed ĝi ne malaperis. Sub la formo de Mezepoka Latina lingvo ĝi daŭrigis ĝia ekzistado kiel lingvo de la privilegiaj klasoj. Dum kelkaj jarcentoj plus, ĝi estis la lingvo de la nobeloj, de la eklezio, de la scienco, de la diplomatio, kaj, generale, de la kulturo.

(Daŭrigos)

Maria José Álvarez Faedo



LA KOSMAVAGULO

La kosmavagulo suriĝis sian kosmanavigon sur la lasta mondeblo kaj oni pretis por esplori ĝin. Multepeza elektratornistro sur siaj dorsoj, kiu ĉiam alportis, memoris al li, ke kvankam li havis grandteknikan ekipaĵon, li estis nur homo limigita, nekapabla por graviti en iu mondo mezutila por survivi.

Dum lasta vojaĝo, maljunulo donis al li, iom antaŭ de sia morto, la mapon de tiu planedo sennomita, perdita en la galaksio Esperides, supozite deveno de siaj prauloj.

Nun li marŝis, malrapide kaj lacige, serĉante siajn proprajn radikojn, kun la espero trovi tie, en lasta mondeblo, loko por ripozi fine, poste sia senfina kosmapilgrimado.

Jam preskaŭ nokte, li alvenis al bordo de senlima kaj nebula profundegaĵo. Nek almenaŭ dum klara tago oni povis vidi la fundon.

Ekde tie, li kontemplis mirkonsternita strangajn flugilhavajn estulojn, fizionomie simila al li, kiuj flugis majeste sur tiu sinistra abismo.

Li ne kredis, ke ili estis siaj prauloj: li ne havis flugilojn. Li sentis, ke tuto estis finita por li kaj nur restis al li submetiĝi al la ripozo de la morto, tie mem, en la faŭkoj de tiu simao malfermita en sia vojo, sub la krepuska lumo de la lasta mondeblo.

Li lasis sian pezan elektrotornistran sur la tero kaj preĝis lastan peton al lasta nekonata dio.

Tiam, genuiĝita sur la polvo, li sentis ion kiu eksteriĝis el siaj dorsoj...


Neniam li flugis antaŭe kun propraj flugiloj. Li sentis timon, ĉar subite li rekuperis iom esperon, kaj la morto ne estis jam la ununura kaj neevitebla solvo.

Tamen, tiu planedo estis la lasta mondeblo kaj li sciis pro sia travivaĵo, ke la vojo ne havas revenon. Krome, siaj prauloj, li jam ne dubis, ke ili estis tio, atendis diligenta al li kaj vigligis kun iliaj kantoj por ke li saltis.

Kaj li flugis, unue mallerta, sed gaja kaj konfida poste, kiam li oni vidis sin graviti per siaj propraj rimedoj, nuda kaj tute senigita de sia ekipaĵo. Oni sentis sin feliĉa inter siaj samspecaj, kvankam la vakuo, kvankam tiu spaco nekonata kaj malluma same la propra nenieco kiu daŭrigis, same kiam li estis kosmovagulo, sub sia flugila flugo.



Damego



MESAĜOJ

* * * * *

Unu fojon plian nia grupo celebris la Zamenhoftagon kunĉiuj kursoj la gesamideanoj apartenantaj al "Astura Esperanto-Asocio" de la najbara urbo el Gijón. Ni, ĉiuj pasigis tre feliĉan kunvenon.

* * *

Ni respondos, plezure, al tri interesaj leteroj, kiujn ni ricevis el diversaj landoj. Ili apartenas al la grupoj Njuvastoej K-Rusio, Staszow-Polando kaj Oktjabrija el Siberio. Al ĉiuj ni esprimas niajn plej bonajn dankemojn pro tiel grava ĝentileco.

* * *

Ni daŭrigas laborante pli kaj pli favore al la disvolvado de tre interesa esperanta lingvo. Ŝajne ke niaj kursoj pligrandigis. Novaj gelernantoj, ĉijare, alvenis al nia grupo.

* * *

En la ĵurnala klubo La Nova Hispanio ("La Nueva España") honore la zamenhofa tago, okazis prelego pri la MANIFESTO DE PRAGO. Pluraj gesamideanoj partoprenis kaj ili disdonis la Manifeston tradukita al la hispana lingvo.

* * *

Nekrologo

Dum la pasinta jaro- monato aŭgusto- forpasis en Gijón, nia tre bona kaj mirigita amiko, samideano Adonis González Meana.. L'estis unu el la fondintoj -en nova etapo- de la fama grupo "Astura Esperanto-Asocio".

Ni, ĉiuj, esprimas la plej sinceran kondolencon al lia familio.

* * *

NIAJ GEAMIKOJ:

ODO AL KAMPARA HEJMO

Mi ekkonas mian hejmon
starantan antaŭ arbaro, freŝa himnesona,
ke estu bone spiri, gustumi, flari,
aŭskulti ventokantelan himnon.

Mi vidas mian hejmon
kuŝantan meze de verdo, bruno, spiko-oro,
ke kampara libervento, plenkolora
kontentigu malsaton kiel pano.

Al mi pozas mia hejmo
spegulanta apud lago, pura sovaĝeja,
ke estu ĝojo lavi, fiŝkapti, naĝi,
utiliĝi per abunda eliksiro

Mi admiras mian hejmon
sudedeklivan de altaĵo, viva rokofirma,
ke estu ŝirmejo kontraŭ ŝtormoj vintraj
birdnivele laŭdi majestan naturon!

Min salutis mia hejmo
videbla ĉe la vojo, diamantsabla kvieta
proksime al migranto, ke vizitvolan
najbaron eblas ofte bonvenigi.


Ĝoje vivas mia hejmo
ĉespunkto kara sub la universa arko,
subtenante poezie Esperanton,
ke estu noble internacieca.


Arbara Stelo - Finnlando

Ajumo

LA ORIGINO DE LA FAJRO

El la revuo La Pratempo

 Legendoj pri la eltrovo de la fajro estas komunaj al la folkloro de ĉiuj popoloj. Multe diversiĝas la aborigenaj mitoj, kiuj traktas la devenon de la fajro. Kelkaj triboj kredas, ke ĝi naskiĝis en ekfulmo; aliaj, ke ĝi venis el brulanta monto, aŭ ke homo ĝin hazarde malkovris.

Legendo de  la indiĝenaj gentoj, kiuj loĝas je la nordokcidentaj marbordoj de Aŭstralio, rakontas kiamaniere la fajro unuafoje venis el la ĉielo.

Du fratoj, nomitaj Kambi kaj Jitabidi (pr.ĝitabidi) loĝis en la ĉielo. Ilia loĝejo estis apud la Suda Kruco kaj iliaj fajroj estis la Montrilsteloj, Alfa kaj Beta Centaŭro. Tiutempe ne ekzistis alia fajro en la universo. Tamen, manĝaĵo malabundiĝis en la ĉielmondo; pro tio, Kambi kaj Jitabidi venis teren, kunportante siajn fajrobastonojn. Ili starigis sian kamploĝejon kaj lasis la fajrobastonojn sur la grundo dum ili foriris por ĉasi posumojn. La ĉasistoj estis tiom longe for, ke la bastonoj, enuiĝinte, ekkuris unu post la alia ĉirkaŭe en la herbaro kaj inter la branĉoj de la arboj. Tiu ludo ekbruligis fajregon, kiu bruldezertigis multon de la ĉirkaŭaĵo. Vidinte la fumon kaj la flamojn, la fratoj revenis tuj al sia surtera loĝejo, rekaptis la petolajn bastonojn kaj remetis ilin en la ĝustan lokon en la ĉielo.


Okazis, ke grupo da aborigenaj ĉasistoj vidis la fajron kaj sentis ĝian varmon. Komprenante la valoron de tiu stranga nova elemento, ili reportis al sia ŝirmejo brulantan lignon, per kiu multaj fajroj ekestiĝis. Nuntempe ĉiuj aborigenoj havas la fajron, kiu iam longe antaŭe apartenis nur al la viroj de la Suda Kruco.

Tradukita de Winsome Greenhalgh, Brisbano

Kunlaborantino: Jennifer R. Bishop. - Aŭstralio



SENTEMO



La avo kaj la avino kverelis, kaj la avino estis tiel kolera ke ŝi ne alparolis sian edzon.

La sekvan tagon, la avo jam plene forgesis la kverelon, sed la avino daŭre lin ignoris kaj ne alparolis. Nu, malgraŭ ĉiuj siaj klopodoj, la avo ne sukcesis venki la mutan sintenon de la avino.

Fine, la avo komencis traserĉi ŝrankojn kaj tirkestojn. Tion li faris dum pluraj minutoj ĝis la avino ne povis deteni sin kaj kriis ĉagrenita: “Ĉu vi povas diri, kion diable vi serĉas?”

“Danke al Dio mi jam trovis ĝin!”, respondis la avo kun malica rideto. “Vian voĉon!”


El “La preĝo de la rano” de Anthony de Mello
Tradukis Liven Dek

ANKORAŬ SEP VIVOJ

*Patriŝa Harkin, Aŭstralio legis
en Melburna ĵurnalo jenon:*

Ŝnutzi ne ĉiam estis tiel grasa. Iam li estis tremanta, malgrasaĉa, forlasita katido, kiu estis trovita en drenilo.

Eble pro tio, li neniam estas ege amema, sed ni ja scias, ke la plimulto de katoj estas iom apartaj, senemociaj bestoj, laŭ lia mastro. Li estis longhara sesjara dombesto. Ĝis nun, la vivo estis malfacila. Li jam perdis du de siaj naŭ vivoj. Antaŭ kvar jaroj, aŭtomobilo frapis lin, kaj tiu akcidento paralizigis lin. La veterinaro diris ke Ŝnutzi devos esti mortigita, sed lia trodorlotanta homfamilio, dum longa tempo, vartis lin ĝis li tutsaniĝis. Post komencis tro sekve suferis senharajn La veterinaro Ŝnutzi suferis rekomendis helpi la katon.



nelonge Ŝnutzi leki sin, kaj aĉaspektajn korpopartojn. opiniis ke deprimon kaj psikologon por melankolian “!psikologo!”

ni ridis, diris la hompatrino de Ŝnutzi. La veterinaraj kontoj jam kostis centoj da dolaroj, kaj kiam li diris al ni “psikologo”, ni pensis, “ĉi tiu vere estas la fino”.

Tamen. Post Ŝnutzi prenis la kontraŭ-deprimitaj piloloj (valium) li ĉesis melankolii. Li denove regajnis sian vivoĝojon, sed ankoraŭ timas la aŭtomobilojn, kaj neŝatas viziti la veterinaron.

Folioj de Kat-Amikaro
Redaktorino .- Ingrid Nāsholm
Linderbergsg. 4.- S-853 56 Sundsvall
Svedujo.-

R E A O

Reao estas eleganta tipa en la argentinaj Patagonio kaj Pampaso. diversaj indiĝenaj churí, choiqué, chara



Por pluraj el la iamaj el Argentino, reao estis prapatro kaj pro tio estis

plurloke donis sian nomon al la tribo men, kie estis adorata, kiel okazis kun la norda popolo *juri*, *xuri* aŭ *suri*, vorto, kiu en la lingvo de tiu etno signifas ekzakte *reao*, ĉar iam en la pratempo tiu besto iĝis homo dum la migradoj.

Legendoj pri reao abundas. Jen unu el la popolo tehuelche: Suno kaj Luno pace foje vivis en Patagonio kun ties filo Pachiantü, petolema knabo. Tiu regiono brile elstaris en la mondo pro la beleco abunde disdonita de la dio Gnechén, tie vivanta.

La gepatroj avertis al Pachiantü, ke li neniam devas alproksimiĝi al la Andoj, la plej okcidenta montaro, kie loĝas Huecubú, dio pri la malbono. La knabo, tamen, altirita de la impona pejzaĝo de la altaĵoj alproksimiĝis kaj la malbona dio sendis 3 vulturojn, kiuj mortigis Pachiantü.

Nekonsolebla doloro nestiĝis en la koroj de Suno kaj Luno, kiuj plorante promesis serĉadi la murdistojn kaj puni ilin.

Gnechén, do, transformis lin en guanakon kaj ŝin en reaon, tiel, ke ili traserĉu la vulturojn en Andoj kaj Patagonio respektive.

De tiam ambaŭ de mateno ĝis vespero trakuradas la vastecon de tiuj regionoj en la aspero iam havigi al si la tiom atendatan kompenson post la morto de Pachiantü.

Atilio Orellana Rojas
Argentina kunlaboranto



Amuzajoj

CISIMO



ŜANGĜIS SIAJN ROLOJN

La gepatroj iras al kinejo kaj lasas la avinon prizorgi la etan Peĉjo. Kiam post tri-hora foresto ili revenas, Peĉjo plendas:

- Fine vi venis! La avino endormis kaj mi devis la tutan tempon gardi ŝin por ne fali de la seĝo.

Lilija Koleva - Bulgario -

Juĝisto al eksedziga petanto: Mi pripensis vian proceson kaj decidis doni al via edzino \$350 semajne.

- Petanto.- Vi estas tre malavara via moŝto. Mi mem penos sendi al ŝi iom da mono de tempo al tempo.

Patricia Harkin - Australio -

Edzino- Karuleto mia, mi havas por vi surprizon! , baldaŭ en nia familio estos triopo!

Edzo- Ĉu vere? -ekkriis ĝoje la edzo

Edzino- Jes, jes, la post semajno mia panjeto venos en nia loĝejon, kaj vivos kun ni.

Juan Varjuhin - Rusio -

Sinjoro eniras ŝuovendejo
- Ĉu vi havas ŝuojn el 42?
- Ne, sinjoro, de la dua
mondmilito restas neniom.

Sur leciono pola lingvo

-Kio la temo alifariĝis sur lasta leciono gramatiko?

-Propono

-Kovalski bonvolu intersanĝi dua propono

-Kiu?.....Mi?

-Tre bone

Kot Zobzistaw - Polonio -

-Kiel nomiĝas la loĝantoj el Belen?
-Pupetoj

- Sinjoro, kial vi parolas neniam?

- Ĉar mi estas mutulo.

PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
 Sendu al:

CISIMO R. SIMON
 c/ La magdalena nº 26 - 1º D
 C.P.33400 - AVILES
 ASTURIAS - ESPAÑA



LAŬ TRADICIA KUTIMO...

El la revuo "HELECO" n° 53


Laŭ tia kutimo jen Ni, kara leganto, bon-
deziras al vi

KRISTMASKOA KAI NOVAA JAROA

Kaj laŭ nia kutimo, eĉ se ne tiom tradi-
cia, kvankam certe jam tro insistema !, Ni me-
morigas Vin pri la grava evento kiun Nia Es-
peranto - Movado travivos dum la tuj komenci-
ĝonta jaro, t.e. pri la Centjarigo de Nia -
Lingvo, pri la JUBILEO !

Ne forgesu, kara leganto, ke la tuta ge-
esperantistaro senescepte kaj nepre, devas al-
porti laŭ siaj kapabloj sian kontribuojon -
por ke la koncerna festado okazu kiel eble
plej adekvate kaj kiel eble plej kontribuu -
al plidivastigado de Nia Lingvo... Ĝis kiam
Ni sukcesu ke Esperanto estu akceptata far
ĉiuj Registaroj kaj devige instruata en ĉiuj
terenoj.

ADONIS



Omaĝe al nia neforgesebla amiko
Adonis González Meana.